ESPERANTO SUB
LA SUDA KRUCO



Numero 13 [1995/1] — Januaro-Februaro 1995

Organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

ISSN 1039-9380

ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj
Redaktoro: Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304, Aŭstralio. ☎ kaj faksoj: 096 46 1389. (Faksoj eblas nur post tujantaŭa averto per telefono, ĉar niaj telefono kaj faksmodemo uzas komunan lineon.) Elektronika poŝto: <don@enkidu.dialix.oz.au>
Correspondence Courses: John Moore, 7 Pelican St, Emu Park Qld 4702
Libroservo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036, Aŭstralio.

EN ĈI TIU NUMERO

Artikoloj:

Reala vivo (Elvie Rowe).....3
Helplingvo aŭ unusola lingvo? (Donald Broadribb).....4
Beletra kvizo pri kvin virinoj en verdaj vestoj (Bernard Golden).....7
Esperanto—la malfacila lingvo? (David Poulson).....10
Averto! Atencisto! (Odlo Bokserp).....14
La malfermita pordo (Saki).....16
Speciala peto.....19
Malnovaj verkoj el Hobarto.....20
Lingva Angulo (Alan Towsey).....20
Skribas la legantoj/Lastmomente.....24

Libroj:

Esperanto kaj la estonteca plurlingvismo, dialogo kun Umberto Eco.....6
Nordmara duopo (rec. Donald Broadribb).....9
Malbeno Kara (rec. Vera Payne).....13
Al vi de mi/San Diego vokas (rec. Donald Broadribb).....14

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: "Ni vere bezonas artikolon pri..."? Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, ŝercdesegnaĵon, foton, leteron. Vi povas sendi vian kontribuon sur komputila disko (Macintosh aŭ MS-DOS, nur $3\frac{1}{2}$-cola) aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, bonvolu atenti: la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

Por konservi la lingvan nivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas redakti kaj korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo, kaj konformigi ĝin al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto. Laŭbezone teksto povos esti mallongigita. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se temas pri io kronologie urĝa. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro. La publikigo de artikolo ne indikas ke ĝi reprezentas la vidpunkton de la Aŭstralia aŭ Nov-Zelanda Esperanto-Asocio.

Limdato por artikoloj por la marta numero: 18 februaro.

Daŭrigo de "Kreskodoloroj" en nia maja (1994) numero:

REALA VIVO
de Elvie Rowe



La decido de Orbuklojo forlasi sian profesion ne plaĉis al Joĉjo. Lia laboro ankaŭ danĝeriĝis. Fakte, li estis nun tiel maltrankviliĝanta ke li decidis riski ĉion per unu ĵeto. Orbuklojo, ĝenita pro lia maltrankvileco, tute ne dormis. Ŝi ne estis surprizita kiam ŝi aŭdis lin revenantan frue. Enirante rapide la domon, li trudis amason da plumoj en ŝiajn brakojn kaj kuris cele al la laborilejo.

"Kion mi faru pri ĉi tiu kokido?" ekkriis Orbuklojo, kies edukado ne ekipis ŝin manipuli vivantan ovarujon.

La plumoj siblis.

"Joĉjo!" Orbuklojo lamentis. "Bonvolu reveni!"

La plumoj pinĉis ŝiajn manojn. Ŝi forĵetis la faskon al la planko. Longa kolo leviĝis de ĝi kaj granda birdo anserpaŝis al ŝi, laŭte minacante.

Orbuklojo, jam sur la tablo, aŭdis hakantan sonon, sekvitan de frakaso kiu klakigis la pladojn enŝrankajn. La eĥoj velkis en misteran silenton.

Finfine Joĉjo reaperis, purigis sian hakilon apud la puto. Li alvenis la pordon.

Orbuklojo ankoraŭ estis sur la tablo. La birdo staris proksime, aspektante tre kolerema. Ĝi sturmis Joĉjon kiam li envenis, sibladante, grakadante kaj klapante mallertajn flugilojn.

Sed ankaŭ Joĉjo estis kolerema. Li ekkaptis la longan kolon kaj ĝin apartigis per unu hakilfrapo.

"Kaj vi ankaŭ!" li resiblis.

Post unu momento li lasis fali la hakilon kaj peze sidiĝis.

"Ho, mia Dio," li ĝemis, kapskuante. "Nun mi ja faris ĝin." Orbuklojo malsupreniris tre singarde. "Kion vi faris?" ŝi flustris.

"Mi mortigis la merdan anseron kiu demetis la orajn merdajn ovojn," respondis li malhele.

Ŝi tordis la manojn. Ŝia edukiĝo ne estis ekipinta ŝin trakti tian krizon.

"Vi devos trovi alian okupon," ŝi diris al li. "Mi malsatas kaj ne estas io ajn manĝebla en la domo."

"Do kuiru la merdan anseron!" li mordminacis. Ŝia bela buŝeto ekmalfermiĝis. Ŝi protestis. "Vi scias ke mi ne povas tuŝi mortintan manĝaĵon."

Joĉjo rigardis ŝin kvazaŭ vidante ŝin unuafoje. Li ekstaris kaj rektigis la ŝultrojn. Poste li eliris, portante la birdon. Ŝi ne plu vidis ĝin kaj ili neniam menciis ĝin.

[Fino en posta numero. ❑]

HELPLINGVO AŬ UNUSOLA LINGVO?

de Donald Broadribb

Estas emfazate en nia reklamado pri Esperanto ke nia celo ne estas establi unusolan lingvon en la mondo, sed duan lingvon, t.e. "helplingvon" por utiligado apud la jamaj naciaj lingvoj. Sed ĉu tiu ja devas esti nia celo? Mi kredas ke ĝi estas nek plenumigebla, nek ĝi estu nia fina celo.

Pensu: vi vojaĝas al alia lando. Kie kaj kiel unue ekaperas la lingva problemo por vi? Nu, tuj trafas vin du eventoj: vi aŭdas voĉojn parolantajn aŭ anoncantajn; kaj vi vidas afiŝojn kaj aliajn skribitajn indikilojn. En kiu lingvo? Nu, kutime en pluraj lingvoj vi aŭdas la publikajn anoncojn en la internacia flughaveno, kaj la indikiloj estas skribitaj en almenaŭ du lingvoj. Se vi iras al fervojstacio? Nu, dependas... En internacia fervojstacio, verŝajne en pluraj lingvoj, same kiel en internacia flughaveno. En ordinara fervojstacio, kiel en ordinara (neinternacia) flughaveno, nur en unu lingvo—la oficiala nacia lingvo. Kiu vizitis Aŭstralion, Usonon, Ĉinion, Rusion, Brazilon, aŭ alian grandan landon, precipe neokcidenteŭropan, tiu spertis ke plejofte la unulingvaj ejoj estas renkontataj, kaj la plurlingvaj malofte aŭ eĉ (en Aŭstralio kaj Usono!) neniam.

Vi veturas en ordinara tramo aŭ en aŭtobuso. La kondukisto ekanoncas ion. En kiom da lingvoj? Nu, nur unu. Se vi ne komprenas tiun lingvon, ja povas esti ke vi vidas ke ĉiuj pasaĝeroj ekdisiradas—kial kaj kien? Neniu klopodas ekspliki al vi, la fremdlingvulo. Se vi demandas al iu kunpasaĝero, preskaŭ neeviteble tiu ne komprenas. Kaj ju pli oni aŭtomatigas la veturilsistemon, des pli mankas eksplikantoj. Ĉu neverŝajna okazo? Ne. Mi mem spertis ĝin.

Nu, vi diras: jen la problemo, kaj la solvo estas ke ĉiu ankaŭ parolu duan lingvon. Sed ĉu tio estas realisma celo? Ĉu *ĉiu* kapablas lerni paroli egalbone du lingvojn? Aŭ eĉ plene igi sin komprenata en du lingvoj? Aŭ ĉu povas nur malgranda lingva elito? Multaj tre inteligentaj personoj ne kapablas. Kaj preskaŭ neniu kapablas egalbone paroli du lingvojn. Eĉ kiam Esperanto estas la dua el tiuj du lingvoj.

Kiom da Esperantistoj vi renkontis, kiuj kapablas egalbone paroli Esperanton kaj la "stratlingvon"? ("Stratlingvo" = la ĉiutaga, kutima lingvo parolata de la socio en kiu radikiĝis la parolanto.) Mi kredas ke vi konas neniom. Eĉ la "denaskaj esperantistoj" ne kapablas, pro multaj faktoroj. Plejparte ĉar preskaŭ ĉio eksterhejma estas konata de ili nur en nacia/etna lingvo. Tio *ne* ŝanĝiĝos se iam ekzistos ĉieuzata dua lingvo. Kontraŭe, nur se oni egale spertas la ĉiutagan vivon eksterhejman kiel enhejman en sama lingvo, nur tiam oni povas plenkapable uzi tiun lingvon. Kaj laŭ la principoj de dulingvismo, tiu stato nek estas celo nek povos ekzisti.

Atentu! Mi ne parolas pri ĉu oni faras erarojn parolante Esperanton. Ĉiu homo faras multajn parolerarojn, negrave kiun lingvon ŝ/li parolas. Tia estas la homa naturo (kaj kiu deziras ke oni parolu kaj skribu kiel roboto?). Se Esperantisto faras nur egalan kvanton da eraroj Esperante kiel en la propra lingvo, ni rajtas nomi ŝ/lin "plenkapabla parolanto". Tute prave. Kaj ne gravas ĉu temas pri unusola lingvo de la mondo, "helplingvo" aŭ—la aktuala situacio—nur unu lingveto inter multegaj.

Estas interese demandi—kaj ŝajne neniu zorge kaj science ekzamenis la demandon—ĉu sincera lernanto de Esperanto lernus paroli Esperanton pli bone ol nacian lingvon, se ni ne atentas la kvanton da lerntempo necesa? Zamenhof proklamis ke jes, kaj ni senescepte ripetas lian proklamon, kvankam sen pruvo. Verŝajnas ke li pravis, sed mi volonte vidus pruvon. Kio estas ĝis nun demonstrita estas nur ke parta lernado de Esperanto ŝajne progresas pli *rapide* ol parta lernado de "natura" lingvo. Estas preskaŭ certe ke se la mondo havus nur unu lingvon, ne gravus ĉu tiu lingvo estus Esperanto aŭ la angla aŭ la ĉina aŭ alia. Neniu lingvo superas alian se oni ĝin uzas dum la tuta vivo kiel sian solan lingvon.

Estas neverŝajne ke nia mondo iam havos nur unu lingvon—mi pesimismas pri tio. La mondo neniam utopios tiom ke vere mankos militado, sed tio ne signifas ke ni ne celu senmilitan mondon, nur ke ni ne iluzie kredu ke ni vidos ĝian efektiviĝon. Simile, por plena interkompreniĝo de la tuta homaro dezirindas ke la mondo havu nur unu lingvon kaj miaopinie ni celu tion, kvankam ĝi eble neniam okazos.

Ankaŭ estas vere ke dua-, help-, lingvo estas dezirinda kvankam ĝi ne solvus la lingvoproblemon. Eĉ iometo da malgrandigo de la lingva kaoso estas dezirinda. Ni devas kontentiĝi per malpli utopiaj esperoj: ke Esperanto pli- faciligas interkomprenon, kvankam ĝi ne certigas ĝin.

Ĉu ni timu la efektiviĝon de unu sola lingvo por la mondo, ne nur de helpaŭ dua-lingvo? Ĉu tio tro unuformigus nin? Ĉu ĝi nuligus kulturan diversecon?

Ĉu estas vere ke lingvo spegulas kulturon? Kvankam estas nuntempe tre populare, deklari ke el la lingvo fontas kulturo, ke la lingvo kiun ni uzas direktas nian pensmanieron, mi kredas ke tio estas grava misanalizo de la homa psiko.

Lingvo *peras* kulturon, sed ĝi ne kreas nek efektivigas kulturon. Lingvoj peras la kulturon de siaj uzantoj. Similigas la kulturojn de la mondo ne lingvoj sed imitemo. Lingvoj en si mem estas kulture neŭtralaj. Ni esprimas niajn kulturajn unikecojn pere de niaj lingvoj, sed tiuj samaj lingvoj povas tutegale facile esprimi aliajn kulturajn unikecojn.

Ĉefe erara supozo estas ke nia pensado okazas perlingve. Ni esprimas niajn pensojn perlingve, sed la pensado mem okazas pli frue kaj pli fundamente ol la transmeto en lingvan formon. Tio kaŭzas ke ni nekomplete esprimas niajn pensojn al aliaj personoj. Sed ne ke niaj pensoj mem estas limigitaj. Kaj ni ja esprimas niajn pensojn ne nur perlingve, sed ankaŭ pergeste, pertone, perbilde, perage. ❑

RICEVITA:

Esperanto kaj la estonteca plurlingvismo. Diskuto kun Umberto Eco. Rotterdam, Universala Esperanto-Asocio, Esperanto-Dokumento 32E, 1994. 24p., broŝurita.

Transskribo de diskuto inter Umberto Eco, István Ertl, kaj François Lo Jacomo, okazinta la 20-an de januaro 1993, en Parizo.

Umberto Eco estas lingvisto ne multe konata inter la publiko anglalingva sed bone konata en Eŭropo. Antaŭ du-tri jaroj li komencis veki intereson inter esperantistoj pro sia favora sinteno al Esperanto, en publikaj prelegoj. Ĉi tiu diskuto pritraktas plurajn priesperantajn temojn: la gepatra lingvo, la ŝancoj de Esperanto, la lingva politiko, plurlingvismo kaj mondpercepto, la fenomeno Esperanto, la timo al la angla; kun speciala pritraktado de dulingvismo kaj la koncepto ke lingvoj limigas la penskapablon.

Mi rekomendas ĉi tiun libreton, kiu koncize kaj aŭtoritate respondas multajn demandojn. DB

Malbeno Kara

(*Precious Bane*)

Verkis: Mary Webb
Tradukis: Grace Kirkwood
Dialektigis kaj editoris: Donald Broadribb,
laŭ praskemo de Trevor Steele kaj Niĉjo Nicholas

Junulino bela sed kun leporlipo, ĉu sorĉistino?
Teksisto juna, bela, forta, el kie veninta?
Frato kiu ne hezitas murdi por plenumigi sian celon
Sorĉisto kiu mistere profetas neeviteblan katastrofon, kaj volonte helpas ĝian efektiviĝon

Ingrediencoj por romano streĉa.

Legaĵo por ekspertaj esperantistoj—ne por komencantoj—
literatura fenomeno kiu fariĝos klasikaĵo en Esperanto.

Normala prezo: AŬ$25 plus sendkostoj
Speciala prezo (nur en Aŭstralio kaj Nov-zelando) ĝis marto 1995:
AŬ$20+$5 sendkostoj
mendu de Donald Broadribb 59B Lukin St, Beverley WA 6304

BELETRA KVIZO PRI KVIN VIRINOJ EN VERDAJ VESTOJ

de Bernard Golden

Tiu ĉi kvizo konsistas el kvin vort-portretoj de virinoj. Ili ne estas esperantistinoj, sed ili estas bone konataj al legemuloj en Esperantujo. Kiom da ili vi povas senvualigi surbaze de la priskriboj en la sekvaj citaĵoj?

1. "La knabino je la unua rigardo ne faris je Pentroniu grandan impreson. Ŝi ŝajnis al li tro maldika. Sed de la momento, kiam li rigardis ŝin pli proksime en la *triclinium*, li ekpensis, ke tamen tiel povas aspekti Aŭroro—kaj, kiel spertulo, li ekkomprenis, ke estas en ŝi io eksterordinara. Ĉion li rimarkis kaj ĉion li taksis: la vizaĝon rozkoloran kaj klaran, kaj la freŝan buŝon, kvazaŭ pretan al kiso, kaj la okulojn, bluajn kiel mara lazuro, kaj la alabastran blankecon de la frunto, kaj la abundon de la malhelaj haroj, trabrilantaj sur bukloj la koloro de sukceno aŭ de korinta kupro—kaj la facilan kolon, kaj la "dian" deklivon de la ŝultroj, kaj la tutan figuron flekseman, gracian, junan per la juneco de majo kaj de ĵus-ekflorintaj floroj. Vekiĝis en li artisto kaj adoranto de belo, kiu eksentis, ke sub statuo de tiu ĉi knabino oni povus subskribi 'printempo'."

2. "La sekvantan tagon, iom antaŭ la reveno de la ĉasistoj, kiam fraŭlino Lydia, post promenado sur la marbordo, reiris al la gastejo kun sia ĉambristino, ŝi rimarkis nigrevestitan junan virinon, rajdantan sur malgranda sed vigla ĉevaleto, kiu eniris la urbon. Post ŝi sekvis, sur alia ĉevalo, kamparano kun jako el bruna drapo, truita ĉe la kubuto, kun ledobotelo ŝultrozone, kaj pistolo en sia zono; en sia mano li tenis pafilon, kies kolbo kuŝis en ledopoŝo firmligita al la selligno; mallongvorte, li estis kostumita tute kiel melodrama bandito, aŭ korsika burĝulo dumvojaĝe. La rimarkinda beleco de la virino altiris la atenton de fraŭlino Lydia. Ŝi aspektis proksimume dudekjara. Ŝi estis granda, blanka, kun malhelbluaj okuloj, roza buŝo, emajlaj dentoj. En ŝia mieno estis legeblaj kune fiereco, maltrankvilo, malĝojo. Surkape ŝi portis tiun vualon el nigra silko nomata *mezzaro*, kiun la Ĝenovanoj enkondukis en Korsikon, kaj kiu tiel bone konvenas virinojn. Longaj plektaĵoj de kaŝtankoloraj haroj kuŝis kvazaŭ turbano ĉirkaŭ ŝia kapo. Ŝia kostumo estis pura sed plej simpla."

3. "Eksciinte, ke la sinjoro vokas ŝin, F— forte ektimis, ŝi iris tamen kun la patrino, Nikolao Petroviĉ kondukis ŝin al la fenestro kaj prenis ŝian kapon per ambaŭ manoj. Esplorante bone ŝian okulon, ruĝan de la inflamo, li ordonis fari kompresojn, kaj mem preparis la medikamenton, kaj disŝirante en pecojn sian naztukon, montris, kiel oni devas meti ilin. F— atente aŭskultis lin kaj kiam li finis, ŝi volis foriri. "Kisu la manon de la sinjoro, malsaĝa infano!"—diris al ŝi Arina. Nikolao Petroviĉ ne donis al ŝi la manon, kaj konfuzita mem kisis ŝian klinitan kapon je la hardisigo. La okulo de F—

baldaŭ resaniĝis, sed la impreso, farita de ŝi je Nikolao Petroviĉ, malaperis ne baldaŭ. Li senĉese vidis spirite ĉi tiun puran, delikatan, time levitan vizaĝon; li sentis sub siaj manoj ŝiajn molajn harojn, vidis ŝiajn senpekajn lipojn malfermetitajn, de post kiuj brilis en la radioj de l'suno ŝiaj malsekaj, perlaj dentoj. Li komencis tre atente rigardi ŝin en la preĝejo, penis plej ofte ekparoli kun ŝi."

4. "Tia, kia [li] nun vidis ŝin, veturanta hejmen de karbotransportado en la arbaro, kun fulgaj manoj kaj argila pipo en la buŝo, vestita per mallonga, sensubŝtofa ŝafpelto kaj strikolora, hejmteksita lanjupo, kun krudaj ŝuoj sur la piedoj kaj tranĉilingo ĉe la brusto, kun grizaj haroj, starantaj supren super maljuna, bela vizaĝo, tia ŝi milfoje aperis al li en la priskriboj[...]

[...]Severa kaj taŭga sinjorino ŝi estas [...] Ŝi portas unu kaj duonan hektolitron da sekalo sur siaj larĝaj ŝultroj. Ŝi akompanas la ferŝtonan transporton de la mineja regiono sur la longa vojo al Ekeby. Kiel transportisto ŝi dormas sur fojneja planko kun sako sub la kapo. En la vintro ŝi povas gardi karbigstakon, en la somero akompani flostrunkaron suden sur Löven. Aplomba sinjorino ŝi estas. Ŝi blasfemas kiel stratknabo kaj kiel reĝo regas sep uzinojn kaj la bienojn de la najbaroj, regas sian propran paroĥon kaj la najbarajn, jes, la tutan belan Vermlandon."

5. "Sur la perono staris juna virino en funebra vesto kun tre pala vizaĝo. Egale pala kaj ankaŭ funebre vestita kvarjara knabineto alkroĉiĝis al ŝiaj manoj, kiuj, kvankam ne perdinte sian forton, pendis tamen velke, donante al la fingro de la virino la eksteraĵon de granda malĝojo kaj sufero. [...]

[...] Sed la juna patrino ne dormis; en sia funebra vesto, kun disliberigitaj nigraj bukloj, kun vizaĝo apogita sur la manplato, ŝi sidis senmove kontraŭ la estingiĝinta fajrejo kaj meditis. Komence mordanta doloro faldis ŝian blankan frunton en kelke da profundaj sulkoj, la okuloj pleniĝis de larmoj, la brusto leviĝadis per malfacilaj ĝemoj. Sed post iom da tempo ŝi ekskuis la kapon, kvazaŭ ŝi volus forpeli la amason da kordoloroj kaj timoj, kiuj ŝin sieĝis, rektigis la talion kaj diris mallaŭte:

— Nova vivo! [...]

[...] Ĉu tiu juna, bela virino kun la gracia talio, la blankaj manoj kaj silkecaj nigraj haroj, dense ĉirkaŭantaj la belforman kapon, posedis ian forton de akirado? ĉu el sia estinteco ŝi elportis ion, el kio ŝi povus krei estontecon? Ŝi meditis pri tio, sidante sur malalta ligna seĝeto antaŭ la ardantaj karboj de la kameno. Ŝiaj okuloj kun esprimo de profunda amo estis fiksitaj sur la vizaĝeto de la infano, kiu trankvile dormis sur la blankaj kusenoj. [...]

(**Rim.:** Neniuj modifoj estis faritaj en la lingvouzo de la tradukintoj.)

[Respondoj troviĝas sur paĝo 26.]

NORDMARA DUOPO
recenzas Donald Broadribb



Nordmara Duopo, elektitaj poemoj de Albert Goodheir kaj Rejna de Jong. Glasgow: Eldonejo Kardo, 1994. £2 (≈ AU $4.25). 28p.

Ĝenerala takso: 🍓🍓

En sia enkonduko William Auld afable citis (sen mencii mian nomon) mian recenzon pri la antaŭa libro de Albert Goodheir, *Enlumiĝo*, recenzo aperinta en nia marta (1994) numero. Do nun denove mi aspiras anonime famiĝi per recenzo pri la plej nova kolekto de poemoj de Goodheir, ĉifoje kun tiuj de lia kunsentanto Rejna de Jong. Denove la plej bona recenzo estas ekzemplo.

Infano

En la plej frua de la someroj
kiam tago ŝafide blankis
mire mi aŭdis la alaŭdon
kanti en arko de lannubetoj;
super floranta fojnherbejo
dancis kriante du vaneloj,
en la kanalo flamis suno,
birde kantis la verdaj junkoj,
kuŝis remaĉe la bovinoj,
verdan terodoron mi flaris
ĝis la grandaj homoj laciĝis,
diris: tempo jam iri hejmen.
Mi ne volis iri kun ili,
mi serĉis lokon por min kaŝi
en la fojnherbo buntkolora,
inter la junkoj akvorandaj,
inter la tremfoliaj salikoj,
resti tie, nenien iri
kiel la birdoj kaj la bovinoj.

Albert Goodheir

→

La Merlo

Dum la krepusko
pintpenike
repentras
la teron
per malhelaj farboj,
la praa merlokanto
min renaskigas Eva;
la brilaj, trilaj tonoj
jubile briliante
envolvas mian nudon.
ree en Paradizo.

Rejna de Jong

Kion diri post tio?
Nur ke sur mia mallarĝa librobreto hejmas nun vera literaturaĵo plia... ❑

ESPERANTO—LA MALFACILA LINGVO?

de David Poulson

Mi ĵus relegis tre interesan artikolon pri Hector Hodler, kiun verkis la konata verkisto kaj historiisto Doktoro Ulrich Lins (*Esperanto*, dec. 1988, p.205-7), kaj aparte trafis min la klareco de lia lingva stilo. Tre rapide kaj facile mi legis ĉi tiun artikolon kaj mi citas sube mallongan specimenon:

> En februaro 1903 Privat venis en la klason kaj montris al Hodler gramatikon de Esperanto, ricevitan de la patro. "Bonan tagon," li diris al Hector, kredante lin surprizi per vortoj en nekonata lingvo. "Saluton!" tiu respondis Esperante, kun brilo en la okuloj. "Ankaŭ mi eklernas, ĉar mi trovis lernolibron inter paperaĉoj."
> Post tri semajnoj la amikoj jam flue interparolis. Ili fondis klubon kaj hektografitan gazeton, *Juna Esperantisto,* la unuan por lernejanoj.

Nu, eble vi ne jam vidis la vorton "hektografitan," tamen mi esperas ke vi povas vidi kiel glate kaj simple esprimas siajn ideojn Doktoro Lins. Efektive, mi forte rekomendas ke vi legu la tutan artikolon (kies cetera duono aperis en la januara numero 1989 de *Esperanto*) pro tio ke, laŭ mia opinio, ĝi estas modelo de bona, leginda Esperanta prozo.

Bedaŭrinde, tiaj modelaj specimenoj ne ĉiam troviĝas en la paĝoj de *Esperanto*. Ofte mi renkontis dum mia senĉesa legado de libroj kaj gazetoj frazojn kiuj estas preskaŭ nekompreneblaj—almenaŭ por mi. Kompreneble, mi ne pretendas esti sperta Esperantisto, sed mi estas ankaŭ ne freŝ-bakita

komencanto kaj maltrankviligas min la fakto ke tiom da malfacilaj frazoj aperas en nia ĉefa gazeto. Kion kredas—ne komencanto, sed mezklera progresanta studento, kiam li aŭ ŝi legas tiajn malklarajn, strangajn esprimaĵojn? Ekzemple, mi citas jene:

> En 1988, dudeko da sociaj organizaĵoj en Sovetunio konsentis kunlabori por el tiu ekologia "labortago" fari dumonatan laborperiodon.
> La datenaro, kun la adresoj de la gazetoj kaj partoprenantoj estas uzebla ankaŭ en la venonta tiuspeca kampanjo—do estas relative malgranda laborinvesto por realigi ĝin.
> Samtempe esperige evoluas la komercaj traktadoj pri la investoj, bezonataj por konduki la aŭtoŝosean ideeton al internacie prospera kaj konkurenciva sistemo, kiu igos la servojn de aŭtomatigitaj oficejoj alireblaj en la lingvo de la klientoj.

Mi ne deziras insulti iun ajn, tial mi donas nek la nomojn de la verkistoj, nek la datojn de la gazetoj en kiuj aperis la ĉi supre cititaj frazoj.

Bonvolu noti ke mi ja ne plendas pri neologismoj: mi ne konsilas ke verkistoj ne uzu iujn vortojn. Kontraŭe, mi atendas trovi novajn vortojn eĉ kiam mi legas librojn verkitajn en la angla lingvo kaj, se ili aperas nur malofte, ili tute ne ĝenas min. La vortuzado de Lins, kiel vi vidis, estas facile komprenebla. Sed, rigardu! mi nun citas mallongan frazon en kiu *ne* estas malkutimaj vortoj. Tamen, la signifo ne estas tuj evidenta al la leganto:

> Fine ĉu memorigi ke mem iĝinte religio la Scienco (kun "S") penis pravigi la plej stultan rasismon de la nazioj?

Kion kredus pri tio Bertram Potts, kiu iam skribis: "Esperanto estas bela lingvo, facile komprenebla kaj esprimoriĉa. La prozo de la lingvo fluas nature, kaj sperta Esperantisto rapide forgesas, ke tio ne estas lia gepatra lingvo." Nu, jes, mi tute konsentas ke foje tiu opinio estas vera, kaj precipe se temas pri la vortoj de la bona Bepo mem... Sed ne ĉiam.

Mi petas, do, ke nia redaktoro konsilu pri ĉi tiu afero. Ĉu miaj plendoj estas pravaj? Se jes, kie kuŝas la kerno de la problemo?

Redaktoro: mi vidas ĉi tie plurajn problemojn.

Unue, ja gravas ke oni trovas nekutimajn vortojn en la citaĵoj. Se oni legas anglalingvan libron, oni povas serĉi esencan vorton en vortaro. Sed en kiu facile havebla vortaro troviĝas "datenaro"? "Aŭtoŝoseo" estas stranga esprimo, ĉar ĉu ne ĉiu ŝoseo estas por aŭtoj? Se oni ne komprenas tiujn du ĉefvortojn, oni malfacile komencas kompreni la frazojn. La verkantoj klarigu nekutimajn vortojn per piednotoj, aŭ, prefere, ili uzu pli klarajn vortojn ("datenaro" = informaro en komputilo; "aŭtoŝoseo" estas Eŭropisma vortfaraĵo, eble Eŭrope "internacia vorto" sed tute ne tutmonde internacia, kvankam "superhighways" estas uzataj tra la tuta mondo. Ĉi tie metaforo: "the information superhighway".)

Due, granda parto de la problemo estas ke la vortordo en diversaj lingvoj tre varias. Esperantistoj plejofte imitas la saman vortordon en Esperanto kiun ili kutime uzas en sia hejma lingvo. (Ankaŭ Zamenhof ofte kulpis pri tre "tordita" vortordo en siaj verkoj.) La sola kuracilo estas multe legadi bonajn verkojn kies

aŭtoroj havas variajn hejmlingvojn. Ĉar ni ja ne volas preskribi rigide la vortordon en Esperanto.

Tamen, en ĉiu lingvo oni ofte supozas ke komplika frazo estas iel pli eleganta ol simpla frazo. Tio estas simptomo de nematureco, negrave ĉu la verkinto estas komencanto aŭ spertulo. En kelkaj el la citaĵoj donitaj de David ni vidas ke la aŭtoroj simple ne celis klare verki.

Multaj personoj volas "laŭmode" verki, kaj uzas formojn kiujn ili vidis eĉ kvankam ili ne plene komprenas ilin.

"Konkurenciva" ("competitive") estas monstra vorto. "Konkurenco" = "industrial competition". Do "konkurenca" = "industrially competitive". Neniu "-iv-" estas bezonata.

Ĝuste nun, oni laŭmode uzas la sufikson "-iv-", eĉ kiam ĝi havas neniun signifon aŭ estas tute ne bezonata. Tiel ni ricevas strangajn vortojn kiaj "intensive", "korektiva", "konkurenciva", kc. Ofte tiaj vortoj uziĝas pro influo de naciaj lingvoj en kiuj -iv- estas kutima.

Plejparte la uzado de tiu (neoficiala) sufikso estas signo de la manko de profunda kono de Esperanto.

Alia multe misuzata sufikso estas "-ik-", kiu simile plejofte ne donas ekstran signifon. Oni povas demandi sin ĉu kelkfoje uzantoj de tia sufikso eble nur volas montri sin kvazaŭerudiciaj per uzado de strangaspektaj, longaj vortoj. Bela ekzemplo estas "primerkatika servo" (? = merchanidizing), trovita en Take—La Domo *04/Oktobro 1994.*

La "principo de neceso kaj sufiĉo" esence diras ke ni uzu tiom da vorteroj por ke ni klare parolu, sed ne pli ol ni vere bezonas por tiu celo. Signo de bona uzanto de Esperanto estas la kapablo klare kaj simple skribi kaj paroli. La sola rimedo estas legadi bonajn verkojn de verkantoj el kiel eble plej multaj lingvo-originoj.

Krome la uzado de interpunkcio en Esperanto estas preskaŭ tute libera — t.e. en la praktiko la verkanto kutime uzas sistemon kutiman en ŝ/lia hejma lingvo. Tio ofte konfuzas legantojn kun aliaj hejmlingvoj.

Sed plej grave: kutimiĝu pensadi rekte en Esperanto ĉiutage. Tiel via propra esprimado en Esperanto fariĝos simpla kaj klara. Kaj se ĉiu Esperantisto faros tion, ne plu ekzistos tiaj priplendindaj frazaĉoj. ❑

Preskaŭ ĉiu, kiu gravas en Esperantio abonas al

EVENTOJ

Ĉu ankaŭ Vi?

Petu senpagan provekzempleron:
pk. 87, H-1675 Budapest, Hungario

MALBENO KARA
recenzas Vera Payne

Malbeno Kara (*Precious Bane)*, de Mary Webb, tr. Grace Kirkwood, dialektigis kaj reviziis Donald Broadribb. 120p., dimensio A4. Eldonis Bookleaf Publishing, Bakers Hill & Beverley WA, Aŭstralio, 1994. $20.00 plus sendkostoj. Ekzempleroj haveblos en la Somerlernejo en Adelajdo; aŭ kontaktu D-ron Broadribb.

Malbeno Kara. Kun tia titolo ĝi nepre devas esti ia Mills kaj Boon frivolaĵo, mi rikane kaj ignoble pensis al mi. Ankoraŭfoje malprave. La titolo venas el la angla klasikaĵo, *Paradizo Perdita* fare de John Milton. La aŭtoro de ĉi tiu hantiga rakonto estis Mary Webb, kiu naskiĝis en la vilaĝo Leighton, Shropshire, en 1881. Ŝi mortis en 1927. Pro *Malbeno Kara* ŝi gajnis la premion Femina Vie Heureuse en 1924-5. Oni aljuĝis ŝian romanon la tiujara plej bona fikcia verko priskribanta anglan vivon,

Aŭstralia Esperantistino, S-ino Grace Kirkwood, tradukis la amatan libron en Esperanton, sed ŝi mortis antaŭ ol ĝi estis finpreta en kontentiga stilo enhavanta la ĉarmon kaj "aŭtentikecon" de la originala dialekto. Ŝi postlasis malgrandan sumon da mono por ĝia finpreparo kaj eldono. Tiucele ĝin plu prilaboris Trevor Steele, Niĉjo Nicholas, kaj Donald Broadribb. Don ankaŭ poluris, redaktis kaj fine eldonis la verkon.

Ĉi tiu historieto vere kortuŝas. Iom elvokiva de *Wuthering Heights*, ĝi prezentas malhelan (sed belan) junulon, pro jamaj spertoj severan, malcedeman, pelitan, pro la malbeno karega. Ankaŭ belulinon molan kaj molkoran, fidindan kaj amindan. Troviĝas patro malpatreca, malbonkora kaj diable venĝema. Rakontas ĉion Pru, laŭ kredo tiama malbela kaj malbenita pro leporlipo. Sed en Pru brilas ĉio bona, kaj la beleco de ŝia animo ne eskapas la novalvenintan teksiston... En la kamparo kun natura belo de pratempa pureco rolas la homaro; ne mankas superstiĉo nek krueleco, paralele kaj kontraste kun agoj bonaj, indaj. La eventoj okazas iomete pli frue ol Waterloo.

Por Esperantistoj, jen esotera frandaĵo. Mi trovis la legadon de la "dialektigita" lingvo malfacila. Jam sur la unua paĝo evidentiĝis, ke estas plej bone legi tre rapide kaj lasi la vortojn sin mem kompletigi laŭ la maniero de "Gestalt". Tamen mi plu bezonis ian helpilon por kompreni kio okazas. Krom la konscio pri mia iom lantpaŝa progreso, mi ankaŭ volis vidi kia estas tiu ŝropsira dialekto. Do, mi pruntеprenis anglan version. Atendis min surprizo. Mi renkontis tiom da strangaĵoj, kiujn mi komprenis nur post serĉado en la Esperanta traduko! Provu mem: "night rails", "dizen", "clem", "withey panniers", "wych", "winnocked", "coney", "besom", "sarsnet, "mommet", "lattance", "randy", "moithered", "murrain", "mere", kaj multaj aliaj. (Dormvestoj, ornami, malsatas, korboj el salikoj, montaj, plendetis, kuniklo, tigara balailo, silko,

pupo, difekto, festo, demandoplena, plago, lago.")

Fakte estis plezure legi la du versiojn kune. Ĉar tiel mi povis aprezi la lertecon kaj koherecon de la "pseŭdo-ŝropsira" traduko. Kia grandega laboro! Sed necesas diri, ke neangla-parolantoj malfacile komprenus kaj plej probable ne ĝuus *Malbeno Kara* en ĝia nuna formo. Fascinis min la klarigoj post la fino de la rakonto. Donald B. donas historieton de la traduko, kaj klarigas pri la bibliaj aludoj. Kia senpezigo legi la belan, kutiman stilon! Kvankam persone mi preferus pli simplan, pli rektan tradukon, mi sincere taksas *Malbeno Kara* vera labor' de amo, kaj ĉiuj kiuj partoprenis en ĝia estiĝo gratulindas.

♪ AL VI DE MI, SAN DIEGO VOKAS ♪

recenzas Donald Broadribb

Al Vi De Mi, kasedo
San Diego Vokas, Kasedo
Kantas: Alberta Casey
Instrumente akompanas: ?
©1981, 1990. Berta Records. Registris Fan Fare Studios, El Cajon, Kalifornio.

Resuma takso:

La Vivo En Roz', Mia Viro, Foje en Mia Vivo, Amu Min Per Tuta Koro, Bonan Nokton, Ĝis la Revido Roma!, La Sekreta Amo, Vieno Urbo de Miaj Revoj, Danci en Mallum', La Mar', Super la Arko, La Gajaj Tagoj Ja, Premu Forte Min, Edelweiss, Kiam Amos Mi, La Bosko Fraksena, Estu Sur Tero Pac'; Flugadi, Ponto Trans Akvo Ŝtorma, Kisu Min Multe, Printempa Sonĝo, Kredis Mi, Amas Mi Parizon, Anim' Kaj Koro, Venu La Klaŭn', Israela Lulkanto, Haj-Lili Haj-Lo, Rozojn Ŝutis Mi, Aloha Oe, San Diego.

Min senplezure surprizis ĉi tiuj kasedoj. Alberta Casey havas voĉon en kiu estas kelkfoje preskaŭ la raŭkeco de Ethel Merman sed sen ŝiaj ĉarmo kaj vivpleneco. Kaj nenia Edith Piaf estas Casey.

"Kompetenta kvankam tre amatora" estus mia ĝenerala takso, se Alberta Casey havus plaĉesonan voĉon. La instrumenta akompanado estas kompetenta, kvankam neentuziasmiga. (Escepto estas *Kisu Min Multe* [*Bésame mucho*] en kiu la muzikakompano estas vigla kaj inspirita.) La kantotradukoj estas ĝenerale bonaj, kelkfoje bonegaj, kaj pleje fidelaj. Nur la teksto de *Kredis mi* [*Yesterday*, de Lennon kaj McCartney] multe varias de la originalo, kvankam la originala sento restas. Casey bone kaj klare prononcas. Sed bele kanti ŝi ne kapablas. Kaj ĉi tiuj kantoj postulas belkantadon. ❑

WINDOW ON THE WORLD

• **Esperanto itself has not yet been awarded a Nobel prize,** in part because it is difficult to find an appropriate category. It is, however, interesting to note that several Nobel prize winners have been part of the Esperanto community. The most recent is winner of the Nobel Prize for Economics, 1994, Prof. Reinhard Selten of the University of Bonn, for his work in game theory. Prof. Selten is a member of the German Esperanto Association and of the Esperanto university group the International Academy of Sciences. He is co-author of "Should we learn Esperanto? An introduction to the theory of language games" with Dr Jonathan Pool. (Noted in *Eventoj* October/2, 1994.)

• **New Cardinal an Esperantist**: *The Catholic Weekly* (Pertersham NSW) in its issue for 30 November 1994 published a three-quarter page article deovoted to Miloslav Vlk of Prague, Czech Republic, under the headline "He believes Esperanto can link people". The article, which is principally devoted to a brief biography of Miloslav Vlk, ends with the comment "he might become the first Pope to write encyclical letters to the whole Church in Esperanto." Miloslav Vlk was elected president of the Council of Conferences of European Bishops in 1993. He was made Cardinal Bishop in 1994.

• **The International Esperanto Museum in the Hofburg, Vienna, Austria** (Internacia Esperanto-Muzeo Wien) has published its statistics for the year 1993:

4957 visitors
104 guided tours of the Museum
4301 books and documents studied on the spot, by 273 persons
338 replies to postal enquiries
The Museum has 21 000 bound books and 12 308 photos.
Books in the Museum are available via interlibrary loan throughout Europe.

(From *Eventoj* October/2, 1994.)

• **The first Esperanto radio broadcast**s took place in 1922, from two stations in two countries. By 1924, 130 stations in 18 countries were broadcasting in Esperanto. The first professional Esperanto radio staff were trained by Radio Poland in preparation for the Universal Congress of Esperanto in Warsaw 1959. Poland was the original home of Esperanto. In the following 35 years Radio Poland has broadcast 42 306 programs in Esperanto, and at present broadcasts two daily half hour Esperanto programs. It continues to have a professional staff of journalists

to produce and broadcast in Esperanto. (From *Internacia Ĵurnalisto* 4/94.)

At the present time 10 international radio stations broadcast in Esperanto a total of 26 hours and 28 minutes a week, from Austria, Beijing (daily), Brazil (daily), Estonia, Havana, Lithuania, Poland (daily), Rome, Sarajevo, and the Vatican. Local stations with regular broadcasts in Esperanto are found in Australia, Brazil, France, Hungary, Italy, New Zealand, and Spain among others. (Compiled from a table in UEA/*Esperanto* Nov. 1994.)

• **The oldest Esperanto magazine** in the world is *Dia Regno*, a religious journal now in its 92nd year. The oldest national Esperanto magazine is right behind it at 90 years, *La Brita Esperantisto* , which published its 922nd issue in November-December of last year. Its current editor, William Auld, has served since 1971. (Information from *La Brita Esperantisto* November-December 1994.)

Our own journal began publication in 1920, but had major breaks in publication, particularly in the years 1909-1919 and 1935-1939 It has been published under a variety of titles, including *La Suda Kruco* (together with the N.Z. Esperanto Association) 1920-1934; *La Rondo* 1940-1957; *The Australian Esperantist* 1958-1992; and at present *Esperanto sub la Suda Kruco* (also together with the N.Z. Association) 1993 to the present.

RECRUITING ESPERANTISTS

by David H. Wild

I agree with the views expressed by Will Green in the current issue of *La Brita Esperantisto* and feel that we are in serious danger of missing the targets that we could hit while we pay attention to others which are potentially much less fruitful. During the twenty-odd years of my membership of BEA and EAB we have had numerous recruitment campaigns but with very little return for our efforts. There was a notable article in *The Independent on Sunday* about Esperanto as a "Design Dinosaur". Although the conclusions in the article were wrong, I think that we must accept that there is nowhere near enough material available to attract people to learn and use Esperanto. We have worried about criticism that "Esperanto has no literature" without recognising that such critics do not want their objections to be answered, and we have neglected the provision of factual material.

This is not to suggest that the material that exists is no good; just that it is not sufficient to persuade doubters to make the effort. If you go into a large branch of W.H. Smith you will see a whole wall covered with "Popular Fiction" but I doubt whether any of this would be sufficient to persuade someone to learn English, although they might find much of it to be quite acceptable reading once they had done so. People *will*, however, make an effort to cope with an unfamiliar language if by doing so they have access to information that they would not find in their

own. Along with quite a few other people, I buy a book *Trams 94* published by an obscure Dutch publisher, because it contains a lot of information about European tramways. I suspect that more people have acquired some knowledge of Dutch because of this book than for all the Dutch literature in existence. A well-researched book, with supporting tables, about, say, narrow-gauge railways in the former Soviet Union would probably attract about a thousand sales in this country [England-ed.] alone— and the buyers would learn some Esperanto to read it.

What I am suggesting is that we should accept that trying to persuade people that Esperanto is a "Good Thing" *in itself* and that they should join EAB, is unlikely to get us much further. I don't believe that there are lots of people out there just waiting to join our organisation if only they knew how. Most people do not join associations, even those which deal with things in which they have a particular interest. In Watford town centre there are four specialist photographic shops in addition to the department and multiple stores which also sell cameras. The members of the local photographic society certainly couldn't spend enough to keep all those shops in business.

This letter isn't, however, a counsel of despair. I believe that there are many thousands of people out there who could be persuaded that it is worth learning Esperanto as an adjunct to a special interest which they already have. As with photography, of course, only a very small proportion of them would join a specifically Esperanto association.

In a recent issue of the Labour Party magazine there was a description of a new quarterly magazine dealing with European socialism, and I feel that some Esperantists ought to have been in there pointing out the advantages of the international language for the purpose of the magazine. Because of the necessity of political neutrality for the UEA, we seem to have neglected the opportunities which politics could bring. These are made greater by the fact that much political thought these days has to take in discussions of what is happening in other countries.

Politics covers very much more than formal party affairs but, if we are to take advantage of any opportunities, we must ensure that any Esperanto approach must be directed to the theme being discussed and not diverted into a socialist, or conservative, or other specialist *Esperanto* association. We should be trying to sell people a tool which will enhance their present interests rather than adding another interest to their collection. A few of them, of course, will become sufficiently interested to join our association, but that shouldn' t be our major aim.

One thing which could work strongly in our favour is the growth of desktop publishing which allows the production of good quality specialist magazines without large investment and for fairly small initial circulation. There are several conditions which such magazines should meet:

• They must be *in* but never *about* Esperanto. Don't forget that the, often heated, debate which takes place about English usage doesn't take place in *Amateur Photographer*, *Computer Shopper* or *Railway Magazine*, although I have no doubt that their editors get many letters about the "grammatical errors" which readers find in them.
• The content must be original, at least in the sense of having been written for the magazine in which it appears, and not made up of collations from other magazines. This is important because people are more likely to respond to an original article than to a report of an article which has appeared elsewhere.
• The quality of the content should be as good as that of comparable national language magazines, even if we can't manage the same production quality.
• They must *not* attempt to recruit readers to Esperanto societies. They could well promote membership of societies which *use* Esperanto to promote the general aims of their members. We must never forget that our aim is to attract people to use Esperanto to extend their own interests and not to attract existing Esperantists to specialist organisations.
• Any advertisements contained in them must relate to the theme of the magazine itself, and must not be for general Esperanto activities. (It would be right for them to contain a leaflet explaining where Esperanto instruction can be obtained, but this is as far as it should go.) A reasonable extension of the activity of Esperanto groups would be in acting as translator for those advertisers who were unable to reply to correspondence in Esperanto.
In addition to politics, other suitable markets are:
• Transport, especially with the coming of the Channel Tunnel. Groups of interest here are transport workers about technical matters, transport workers as employees and transport enthusiasts. These last are always hungry for information and are prepared to put quite a bit of effort into reading about their subjects.
• Education, which could attract many parents, and teaching, which is related but not quite the same.
• Public health.
• Conservation and the environment. This is a very good example of a subject where the non-professional may have as valid an input as anybody else.

There can be no doubt that we have an urgent need for more users of Esperanto from whom we can recruit new members for our association and I want to put these proposals forward as a reasonable way of achieving our aim...

I see the eventual role of Esperanto Associations as being a "ginger group", helping and encouraging those who wish to use Esperanto. As I said earlier, most people will not want to join but if we could make my proposals work the pool of potential members would be greatly increased.

[Reprinted from *La Brita Esperantisto* November-December 1994.]

Januaro-Februaro 1995

AVERTON! ATENCISTO!



Ĉu vi renkontis ĉi tiun ulon? Li pretendas esti Odlo Bokserp, sed, kiel scias ĉiu nia leganto, temas pri absurda fraŭdisto. *Internacia Ĵurnalisto*, nia esperanta brancho de Interpolo, cirkuligis lian foton esperante ke eblos lin kapti kaj enkarcerigi. Lin oni serĉas en pli ol cento da landoj. Nefidinda raporto indikas ke li troveblas en Aŭstralio, Nov-Zelando, Antarktiko, aŭ eble aliloke.

La ĉimaldekstra foto unue aperis en *La Eta Gazeto* (Triesto). *Internacia Ĵurnalisto* intencis elekti lin honora dumviva membro, sed iu en la unupersona stabo de la redakcio de *IĴ* kredis rekoni la foton kiel tiun de internacia teruristo. Efektive, li estas fondinta membro de la Internacia Terurista Asocio/Anomima Terurisma Akademio (ITA/ATA); kaj li preskaŭ ricevis la Nobelpremion por Milito pro sia invento de la novepoka eksplodpulvoro *dinamato*, sed li estis juĝita neinda pro sia tromodernismemo kaj kontraŭfundamentismemo—nu, tial *IĴ* decidis ke li estas senkvalifika por membreco, kvankam la vera Preskoboldo estas la efektiva redaktanto de pli ol ducento da esperantaj gazetoj kaj krome de plurmil nacilingvaj periodaĵoj kiel ankaŭ de multgigantnombraj libroj kaj aliaj eldonaĵoj—kio ja estis justa decido. [Reaktoro, ĉu mi sukcesis verki la plej longan frazon en la esperanta gazeta historio? ... nu, bonvolu rekalkuli la vortojn, mi plencertas ke la antaŭa rekordo estis nur 104 vortoj, kaj mi kalkulis *IĴ* kiel nur unu vorton, kaj ankaŭ "kontraŭfundamentismemo", kvankam Zamenhof ja diris ke tiu "vorto" efektive konsistas el kvin vortoj kaj ... jes, okej, mi apelacios al la *Guiness Libro de Rekordoj* ... dankon pro nenio.]

La reala Odlo Bokserp, kiu nun estas la ĉefredaktoro de *Esperanto sub la Sudsy Kruĉo*, naskiĝis en la Nigra Arbaro en Germanio en la jaro 1375. En 1376 li doktoriĝis pri manuskriptfuŝado en la Unuverŝistato de Gotenburgo. Post la inventiĝo de la presarto en la jaro 1387 li redoktoriĝis pri tiu fako, kaj elektiĝis membro de la Akademio Internacia de Sciencoj San Martinio pro sia eltrovo de kokteloj, en la jaro 1388. En 1389 li estis senkapigita de la reĝo Sankta Jakobo XXXII, sed, nesenkuraĝigite, en 1390 li disvendadis la *Enciklopedion de Esperanto*. En 1391 li verkis sian junecaŭtobiografion *Kredu Min Sinplorino*, kaj estis mortpafita de Bernard Golden pro kontraŭfundamentismo, peko anatemita de Papo Lazaro Ludo Viko II en 1391 unu horon antaŭ la publikiĝo de tiu libro. Post trimonata konvaleskado Odlo transloĝiĝis al Francio kie li [La originala artikolo finiĝis ĉivorte.]

(*Artikolo verkita de Odlo Poksberp, represita el* Internacia Ĵuralisto *4½/94.*)

LA MALFERMITA PORDO

de Saki

tradukis Edmund Grimley-Evans

Mia onklino malsuprenvenos baldaŭ, S-ro Nuttel," diris tre aplomba sinjorineto de dekkvin jaroj, "dume vi devos klopodi min toleri."

Framton Nuttel klopodis trovi la trafan vortigon, kiu dece flatos la nevinon nunan, sen nedece malplivalorigi la onklinon venontan. Kaŝe li dubis pli ol antaŭe, ĉu tiaj ĉi formalaj vizitoj al serio de tute nekonataj homoj multon kontribuos al la kuracado de liaj nervoj, kion li bezonas atenti.

"Mi scias, kio okazos," lia fratino estis dirinta, dum li preparis sin por migri al tiu ĉi kampara ripozejo, "vi kvazaŭ kaŝos vin tie, ne parolante al iu ajn, kaj viaj nervoj estos pli malbonaj ol ĉiam pro izolo kaj malgajado. Mi simple donos al vi leterojn por prezenti vin al ĉiuj miaj konatoj tie. Kelkaj el ili, laŭ mia memoro, estis eĉ iom agrablaj."

Framton demandis sin, ĉu S-ino Sappleton, la sinjorino al kiu li estis prezentonta sin per unu el siaj leteroj de prezento, enestas la agrablan kategorion.

"Ĉu vi konas multajn homojn en la ĉirkaŭaĵo?" demandis la nevino, kiam ŝi juĝis ke ili jam sufiĉe longe kunsentis en silento.

"Preskaŭ neniom," diris Framton. "Mia fratino loĝis tie ĉi, en la Pastrodomo, vi komprenu, antaŭ ĉirkaŭ kvar jaroj, kaj ŝi donis al mi leterojn de prezento adresitajn al kelkaj homoj ĉi tie."

Li prononcis la lastan fakton per tono de aŭdebla bedaŭro.

"En tiu okazo, vi scias preskaŭ nenion pri mia onklino, ĉu?" daŭrigis la aplomba sinjorineto.

"Nur ŝiajn nomon kaj adreson," la gasto konfesis. Li demandas sin ĉu S-ino Sappleton estas en edzina aŭ vidvina stato. Ia nedifinebla io en la ĉambro ŝajnis sugestii viran loĝadon.

"Ŝia granda tragedio trafis ŝin antaŭ precize tri jaroj," diris la infano, "tio devas esti post la tempo de via fratino."

"Ŝia tragedio?" demandis Framton. Ial tragedioj ne ŝajnis akordiĝi kun tiu ĉi ripozema kampara loko.

"Vi eble demandas vin kial ni tenas tiun pordon tute malfermita en oktobro posttagmeze," diris la nevino, indikante grandan fenestropordon kiu staris malfermita al gazono.

"Estas tre varme por la jartempo," diris Framton, "sed ĉu tiu pordo iel rilatas al la tragedio?"

"Tra tiu pordo, antaŭ precize tri jaroj je la sama dato, eliris ŝia edzo kaj ŝiaj du junaj fratoj por sia tago da ĉaspafado. Ili neniam revenis. Dum ili transiris la erikejon por atingi sian plej amatan terpecon por galinago-pafado, ĉiuj tri englutiĝis en perfidan marĉaĵon. Okazis tiu terura malseka somero, vi

scias, kaj lokoj kiuj en aliaj jaroj estas tute sekuraj—ili enfalis sen ia averto. Oni neniam retrovis la kadavrojn; tio estas la terura parto de la afero." Nun la voĉo de la junulino perdis sian aplomban tonon kaj iĝis ŝanceliĝe homa. "La kompatinda Onklino ĉiam kredas ke ili revenos je iu tago, ili kaj la malgranda bruna spanielo kiu perdiĝis kun ili, kaj enpaŝos tra tiu pordo ĝuste tiel, kiel ili kutimis. Jen kial ni tenas la pordon malfermita ĉiun vesperon ĝis plena krepusko. Kompatinda kara Onklino, ŝi jam ofte rakontis al mi kiel ili foriris, ŝia edzo kun sia blanka akvimuna mantelo sur la brako, kaj Ronnie, ŝia plej juna frato, kiu kantis 'Bertie, kial vi saltetas?', kion li ĉiam faris por turmenteti ŝin, ĉar ŝi diris ke tio agacas ŝin. Ĉu vi scias ke, kelkfoje, je senbrizaj, kvietaj vesperoj, kiel nun, mi preskaŭ havas harstarigan senton, ke ili ja enpaŝos tra tiu pordo..." Ŝi ĉesis paroli kun eta hororfremo. Estis por Framton senpezigo kiam la onklino laŭte eniris la ĉambron kun kirlo da senkulpigoj pro sia malfrua apero.

"Mi esperas ke Vera amuzis vin," ŝi diris.

"Ŝi estis tre interesa," diris Framton.

"Mi esperas ke la malfermita pordo ne ĝenas vin," diris S-ino Sappleton vigle. "Miaj edzo kaj fratoj baldaŭ revenos de la ĉaspafado, kaj ili ĉiam eniras tie ĉi. Hodiaŭ ili ĉasis galinagojn sur la marĉoj, do ili faros belan malpuraĵon sur miaj malfeliĉaj tapiŝoj. Tre tipe pri vi viroj, ĉu ne?"

Ŝi gaje babiladis pri la pafado kaj la malabundo de birdoj, kaj la eblaj sortoj de anasoj en la vintro. Por Framton, ĉio estis tute horora. Li faris kuraĝan sed nur parte sukcesan provon redirekti la konversacion al malpli terura temo; li konsciis, ke lia gastigantino donas al li nur parteton de sia atento, kaj ke ŝiaj okuloj senĉese vagas preter lin al la malfermita pordo kaj al la gazono preter ĝi. Certe estis malfeliĉa koincido, ke li faris sian viziton je tiu ĉi datreveno de tragedio.

"La kuracistoj ordonis al mi plenan ripozon, mankon de mensa ekscitiĝo, kaj eviton de ĉio havanta la naturon de fortega korpa ekzerciĝo," anoncis Framton, kiu vivis kun la sufiĉe disvastiĝinta iluzio ke tute nekonataj kaj hazarde renkontataj homoj avide deziregas ian informon pri oniaj malsanoj kaj malfortecoj, iliaj kaŭzo kaj kuracilo. "Pri la dieto ili ne tre bone interakordas," li daŭrigis.

"Ne?" diris S-ino Sappleton, per voĉo kiu anstataŭis oscedon nur je la lasta momento. Tiam ŝi subite heliĝis en viglan atenton—sed ne al tio, kion parolis Framton.

"Jen ili finfine!" ŝi kriis. "Ĝuste akurataj por vespermanĝo, kaj ĉu ili ne aspektas kvazaŭ enkotiĝintaj ĝis la okuloj!"

Framton iomete tremis kaj turnis sin al la nevino kun mieno intencita komuniki simpatian komprenon. La infano fiksrigardis al la malfermita pordo kun sensobtuza hororo en la okuloj. En glacia ŝoko de sennoma teruro, Framton fulme turnis sin en sia fotelo por rigardi en la saman direkton.

En la iĝanta krepusko tri figuroj paŝis tra la gazono cele al la pordo; ili ĉiuj portis po pafilon sub la brako, kaj unu el ili estis aldone ŝarĝita per blanka

mantelo pendigita trans la ŝultroj. Laca bruna spanielo tenis sin proksime al iliaj kalkanoj. Senbrue ili alproksimiĝis la domon, kaj raŭka juna voĉo eksonis el la malhelo: "Mi diras, Bertie, kial vi saltetas?"

Framton kaptis panike siajn bastonon kaj ĉapelon; la vestibla pordo, la gruza avenuo kaj la ĝardena pordego estis malklare konstatataj etapoj en lia freneza fuĝo. Biciklisto kiu venis laŭ la strato devis veturi en la heĝon por eviti tuj okazontan kolizion.

"Jen ni, mia kara," diris la portanto de la blanka pluvmantelo, envenante tra la fenestropordo, "iom kotaj, sed estas plejparte seke. Kiu estis tiu, kiu forkuregis dum ni alvenis?"

"Tute eksterordinara viro, iu S-ro Nuttel," diris S-ino Sappleton, "li povis paroli nur pri sia malsano, kaj forkuris sen ajna adiaŭo aŭ pardonpeto kiam vi alvenis. Oni povus pensi ke li vidis fantomon."

"Mi supozas ke pro la spanielo," diris la nevino trankvile. "Li diris al mi ke li teruriĝas je hundoj. Li iufoje estis ĉasita de bando de pario-hundoj en tombejon ie sur la bordoj de Gango kaj devis pasigi la nokton en nove fosita tombo, dum la bestoj rikane mordminacis kaj ŝaŭmis tuj super li. Sufiĉe por difekti la nervojn de iu ajn."

Fabelado sen antaŭa averto estis ŝia specialaĵo. ❑

UTILAJ NOTOJ

Kiel skribi nombrojn?

Se vi malfacile memoras kiel skribi nombrojn, jen facila metodo:

Unu vorto por ĉiu numero:

1492

mil kvarcent naŭdek du

1 4 9 2

Post -ita, -ata, -ota *de* signifas *by*:

La mono estis ricevita de la kasisto The money was received by the treasurer

***disde* signifas *from*:**

La mono estis ricevita disde la membroj The money was received from the members

En ĉiuj aliaj frazoj, *de* kutime signifas *from*:

I drove from Melbourne to Canberra Mi aŭtis de Melburno al Kanbero.

***el* signifas *out of*:**

He walked out of the house Li marŝis el la domo

Kelkfoje *de* kaj *el* estas ambaŭ uzeblaj:

The money came from Germany La mono venis el/de Germanio. DB

SPECIALA PETO

Ni deziras manuskriptojn de novaj verkantoj por nia *Esperanto sub la Suda Kruco.* La intereso kaj valoro de nia gazeto dependas de la konstanta enfluo de novaj vidpunktoj kaj novaj kontribuoj.

Verkojn kaj por la esperanta kaj por la anglalingva partoj de *ESK* ni volonte bonvenigos.

Ni kompostas la gazeton per speciala komputilaparataro. Bonvolu helpi nin, kiam vi sendas vian verkon, ĉi tiel:

Se vi sendas manuskripton, bonvolu tajpi ĝin, kaj uzu *nur* freŝan rubandon; tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio. Kaj ne metu ian ajn korekton en la tekston de via artikolo. *Metu korektojn nur en la marĝenojn.*—Kial? Ĉar ni uzas specialan kompost-sistemon kiu evitigas la neceson retajpi viajn verkojn. Vian manuskripton legas skanilo (speco de fotokopiilo konektita al nia komputilo) kaj speciala programo en la komputilo aŭtomate kompostas ĝin. Tio bone sukcesas nur kiam la tekstokolumno sur viaj manuskriptaj paĝoj estas nigre tajpita, klara, kaj sen krajonaj aŭ plumaj linioj kaj makuloj. Se manskribaĵoj aŭ makuloj estas en via teksto, aŭ la tajpaĵo estas pala, la aparato mislegas. Ĝi tamen ne legas la marĝenojn, do vi povas enmarĝene indiki viajn korektojn kc.

Plej dezirinde estas, kompreneble, ke vi sendu viajn verkojn sur komputildisko; tiel kopieraroj nuliĝas. Sed se vi ne povas sendi komputildiskan tekston, manuskripto tajpita laŭ la ĉisupraj instrukcioj estas plene akceptebla.

Ne timu fari erarojn. Via redaktoro severe korektos ilin antaŭ publikigo.

Antaŭdankon. Kaj mi esperas ricevi *vian* verkon baldaŭ.

Donald Broadribb

Elektronika Poŝto kaj Faksoj

Ĉar ni ĵus instalis faksmodemon, *Esperanto sub la Suda Kruco* nun povas akcepti elektronikan poŝton. Nia adreso: <don@enkidu.dialix.oz.au>. Ni legas la poŝtkeston trifoje en la semajno, do ne atendu tujan reagon! (Ekspliko de la adreso: don = mi; enkidu = la persona nomo de nia komputilo; dialix = la agentejo kiu peras la elektronikan poŝton; oz = Ozo = Aŭstralio. Au = Aŭstralio. [Kial kaj Oz kaj Au? Verŝajne por ke la elektronikaj kanguruoj povu legi la adreson, mi supozas, ĉar ili parolas nur la Ozan lingvon.][1]

Ni ankaŭ povas akcepti (kaj sendi) faksojn. Sed ĉar nia faksmodemo uzas la saman lineon kiel la telefono—096 46 1389—necesas ke ni speciale ŝaltu la faksprogramon. Tial, fakso sukcesas *nur* se vi per antaŭa telefonatentigo informas nin ke ĝi tuj venos.

Donald Broadribb

---

[1]Por nesciantoj: Oz estis nomo donita al Aŭstralio de la usona teatra gazeto *Variety* antaŭ multaj jaroj. Ĝi populariĝis kiel familiara nomo por Aŭstralio, kaj ĉie en Aŭstralio estas uzata por ameme nomi nian landon.—DB

MALNOVAJ VERKOJ EL HOBARTO

kontribuis W. Dudley Parkinson

Antaŭ ses monatoj amiko pruntis al mi preskaŭ sepcent poŝtkartojn skribitajn al Esperantistoj en Hobarto de 1907 ĝis 1910 el preskaŭ dek du landoj. La lingvo, kompreneble, estas Esperanto. Mi jam transskribis la duonon: tiujn senditajn al S-ino Mary Steele. Inter la poŝtkartoj mi trovis ĉi tiujn poemetojn verkitajn de Mary Steele en 1912:

Simio parolis al si
"Ŝajnas tute neebla ke li
Estaĵo ridinda kaj malestiminda
Povas iel simili al mi".

Se nin mem ni povus vidi
Kiel vidis nin aliaj
Ni kredeble volus ridi
Pro la absurdaĵoj niaj. ❑

LINGVA ANGULO

de Alan Towsey

A RED HERRING CAUGHT RED-HANDED!

Vera Payne's use of the English expression "a red herring", which she translated as "ruĝa haringo" in her review of *Refoje Sep Krimnoveloj* on p. 7 of the Nov.-Dec. 94 number of *ESK*, necessitating a footnote by our editor for the benefit of those not familiar with English idioms, while picturesque—it might even catch on!—should act as a *red light* (*ruĝa signalo* here—normally *ruĝa (trafik)-lumo)* to our readers against translating an idiom from any language into Esperanto without careful thought.

In none of the languages with which I am acquainted, European or Asian, is this expression used, and, I suspect, would not be understood in most cases. What is its origin?

It first appeared in the nineteenth century. A salted, smoked herring turns a reddish colour, and has a strong smell. People who were opposed to fox-hunting by the aristocracy (a peculiarly English custom?) would draw a red herring across the fox's trail and so put the hounds off the scent. Later the expression took on the figurative meaning of diverting people's attention away from the main point, or, in the case of a detective story, from the real

culprit.

In this latter sense our editor's *falsa spuro* is an apt translation (and, incidentally, reflects one rendering in German and Dutch and Italian). For other contexts Felix Woolf's *English Phrases and Expressions in Esperanto* suggests *erarigilo*, but to me that smacks too much of an instrument, and I think *erariga argumento/aserto* etc. would be better.

The expression *(kapti) ... ĉe la freŝa faro* quoted by Vera at the top of p. 8 can, of course, be translated as "catch red-handed" (from catching a murderer with his hands still red with the blood of his victim).

Several years ago Frank Banham, at that time editor of *La Suda Kruco* (the former title of the organ of the Australian Esperanto Association) used in an item the expression *ruĝlitera tago* for "a red-letter day". When I protestedthat this idiom would not be universally understood, Frank pointed out that it already existed in Esperanto—it is, in fact, in *PIV*; the quotation is from Kalocsay, who was a brilliant linguist.

Again, what is its origin? In the Middle Ages it became customary to mark feast days and saint's days in red on the calendar, the others in black. These were days for celebration, and so days which had a special significance deserving of celebration for anyone at all began to be referred to as "red-letter days". Thus it is a *Christian* expression, and as such it would not be familiar to most non-Christians. Not only that, but again it is not used in its figurative sense in any of the languages of which I have any knowledge, not even the European (Christian) ones. French and Italian render that sense chiefly as a"memorable day", and so I still think, in spite of *PIV*, that *memorinda tago* is preferable to *ruĝlitera tago*, being universally understandable.

And "red tape"? This goes back to the 17th century, when the practice of tying official documents in bundles with red tape began. In the modern sense I think *burokrataĵo* or *burokrata rutino* is the most apt rendering.

CONVERSATION

We have all noticed how we all pause momentarily in the course of conversation to collect our thoughts, to consider what we are going to say next, but, to avoid interrupting the flow of speech, pop in expressions like "you know", "I mean", "well etc. —some people do it to a quite irritating extent!—and, responding to others when they stop for breath or effect, say "Really?", "Is that so?", "You don't say?" "Well I never!", "No way!" etc.

One of the reasons many people don't feel quite at home, or feel ill at ease, during conversation in a foreign language, and consequently let others do most of the talking, is that they just don't know how to express these ideas in the other language. I propose, therefore, from time to time to list some common expressions that you can use to make your conversation in Esperanto sound more natural and let you yourself feel more at ease. Learn them well and use them!

Let's start with *ja*. This particle is used to emphasise a word or idea, and

may be rendered into English in a number of ways. Basically it means "assuredly, indeed, in fact, really, truly, to be sure" and so on. The position of the stress in the sentence often gives a different shade of meaning. So:

Vi **ja** faris tion!—You **did** do it!

Li **ja** estas mia patro!—He **is** my father! (even though you don't think so)

Li ja estas mia **patro**—He **is** my **father**, you know/After all, he **is** my **father**.

Sed ni ja scias, ke da lingvoj ekzistas tre multe.[z]—(*PIV*) But we do know that there are many languages.

Sed mi ja mem venis al tiuj ideoj.[z] (*PIV*)—But **I myself** got to thinking that way.

It may also indicate expostulation, remonstrance. Some examples from Butler:

Tio ja estas vera—Indeed it **is** true (whatever you may think to the contrary) (cf. Tio ja estas vera, sed ...—Yes, that's true, but ...) (See below)

Mi **ja** skribas—Don't you see that I **am** writing? (Mi ja **skribas**!—(Don't you see that) I'm **writing**!)

Mi ja **diris** tion!—I **told** you so!

Li ja estas edzo—He's actually married, you see.

Li ja estas kulpa, tamen li estas nur infano—Although/I grant you, he **is** guilty nevertheless he's only a child.

Jes ja!—Yes indeed!

Another useful particle is *nu* (= well! well now! Come now! And yet it must be admitted; you must know, etc.) Nu do—well then!

Butler suggests that it "gives various tones to the sentence, as suggested by context or tone of voice.

(Acquiescence, concession) Nu do, venu, se vi vere insistas—Well then, come, if you insist.

(Argument) Nu! Li diris, ke vi eraras—Well! He said you're wrong!

Nu, vi konsentos, ke ...—Well, you'll agree that ...

Nu, vi estas homo, do vi povas erari—Well, you're only human, so you could be wrong.

(Astonishment, surprise) Nu, kiu supozus tion!—Well (I never), who'd ever think that?

Nu, mi neniam!—Well, not me, ever!

(Calling attention) Nu, aŭskultu—Well, listen.

(Doubt, hesitation) Nu, kio pri la hundo? —Well, what about the dog?

(Explanation) Nu, Barabas estis rabisto—Now, Barabas was a robber.

(Ending conversation) Nu, bonan nokton—Well, good night (I'm going to bed)

(Expostulation) Nu nu! Kiu povus kredi tion!—Well, well! Who'd ever believe it!

(Impatience) Nu, finfine vi alvenis!—Well, you finally got here!

(Resignation) Nu, tia estas la vivo—Well, such is life.
(Soothing) Nu, nu! Ne ploru!— Now, now, don't cry!"

And now, here are a few useful "fillers":

Ĉu? Ĉu vere?—Really? You don't say! Is that so? I'll be a monkey's uncle!
Ĉu ne?—Isn't it? Doesn't he? Didn't she? Will you? etc. (after a statement, e.g. He's here, isn't he? Li ne venos, ĉu?—He won't come, will he?)
Eble—Maybe. Tute ne! Neniel!—No way! Ha!—Ah! Aĥ!—Ah! Alas! Heigh ho!
Aha! (irony, surprise, suspicion, triumph) Ha lo—Hello (telephone). Ha ha! (laughter
He!—Hullo! Hey! Ahem!(to attract attention, gain time, etc.) Hm! (polite dissent, hesitation). Hoj!—Ahoy! Hi! (to call attention). Hu!—Crikey! (denotes a sudden start, or jocular wonder). Ho!—Oh! Ho ve!—Oh dear! Alas!
Aj! Aŭ![z]—Ow ! (sudden twinge of pain)
Kio(n)?—What (did you say)?
Jen vi havas!—Here's a fine mess/a fine to-do/ a pretty kettle of fish!
Ĝuste!—Right! Daŭrigu!—Go on (= continue). Vi ŝercas!—Go on! (= I don't believe it). Antaŭen!—Go on! (= Keep moving forward, go ahead)
Brave!—Well done! Bravo! Good on you! Bonvenon!—Welcome!
Atentu!—Look out! Pay attention!
Ne eble!—It's not possible! ĉu eble? Is it possible? You reckon?
Haltu!—Stop! Rapidu!—Hurry up! For!—Beat it! Parenteze—By the way. Kompreneble—of course. Fi! Hontu!—You should be ashamed of yourself! Helpu!—Help! Hura!—Hooray! Silentu!—Be quiet! Shut up! ŝŝ—sh!
Dio mia!—Dear me! Dank' al Dio! Thank God!

Expressions like "Holy mackerel! Holy cow!" etc. take their meaning from the context, depending on whether one is surprised, incredulous, shocked etc. Try:

Oj! Ve! Ĉu (vere)? Jen vi havas! Ne kredeble!
N.B. Mankas klapo en lia kapo.[z]—He's got a screw loose.
Li havas muŝon en la kapo/cerbo—He's got bats in the belfry, He's nuts!

ŜATI

With reference to the letter from Georgo Kamaĉo in the Nov.-Dec. number of *ESK*, it seems that usage has finally prevailed over the *Fundamento* meaning of this word, as is normal in all living languages, and that there has indeed been a "drastic semantic shift" from the original meaning. Unlike Claude Piron, although I have travelled pretty widely, I have not yet had the pleasure of conversing with Esperantists in all five (six?) continents![1] ❑

---

[1]Aŭstralio, Antarktiko, Norda Ameriko, Suda Ameriko, Afriko, Eŭropo, Azio—*sep* kontinentoj.—Alan informas min ke li kutime kalkulas Eŭropon kaj Azion kiel unu kontinenton, kaj ofte forgesas Antarktikon. Eble simile estas rilate al la mencio pri "la kvin kontinentoj" trovebla en *Take—La Domo* 04 Oktobro 1994.

SKRIBAS LA LEGANTOJ

Donaco por la UK en Adelajdo

Subtenante la pledon de la Prezidanto de AEA, Juĝisto Kep Enderby, en la Novembra-Decembra numerode *Esperanto sub la Suda Kruco*, mi deziras informi la legantaron ke ni jam ricevis donacon de AŬD $145 de S-ro Josimi Umeda (Japanio). Ni esperas ke ankaŭ multaj aŭstralazianoj sendos donacojn por helpi la okazigon de la unua Universala Kongreso en nia mondparto.
Mia adreso etas Box 257, Strathalbyn SA 5255. Ĉekoj estu pageblaj al "1997 LKK account".

Rochelle Jacquier
(Kasisto, LKK, 82a Universala Kongreso de Esperanto)

LASTMOMENTE

• ***La Kongreso de AEA***: bonvolu korekti du erarojn kiuj ŝteliĝis en la informfolion dissenditan kun nia lasta numero. Sur paĝo 2 (Detaloj), linio 4, la ĝusta nomo estas Ferry Road, ne Ferny Road. Sur paĝo 3 (Programo), por Lingvo-Seminario je lundo 3 julio, la ĝusta horo estas 9.00-10.00, ne 10.30-12.00.

• ***Nova Kardinalo estas Esperantisto***: *The Catholic Weekly* (Pertersham NSW) en sia numero por 30 Novembro 1994 aperigis preskaŭ tutpaĝan artikolon pri Miloslav Vlk de Prago, sub titolo "He believes Esperanto can link people" . La artikolo iom ironie komentas ĉe sia fino, "he might become the first Pope to write encyclical letters to the whole Church in Esperanto." Miloslav Vlk estas prezidanto de la Koncilio de Konferencoj de Eŭropaj Episkopoj.

Mazi en Gondolando eble ne aperos *pro manko de sufiĉaj antaŭmendoj.* Necesas 800 antaŭmendoj, sed ĝis oktobro alvenis nur 200. Ĉar ĉi tiu projekto estas eble la plej grava instruprojekto ĝis nun entreprenita por Esperanto, ni petegas niajn grupojn kaj subtenemajn membrojn antaŭpage mendi la vidbendkurson. La kosto estas 98 nederlandaj guldenoj (transpageblaj pere de la Libroservo de AEA). Pretigas la televidfilmon Internacia Esperanto Instituto. La unua leciono estos rigardebla en la Somerlernejo en Adelajdo jam ĉimonate.

• ***El Popola Ĉinio*** eldonos jubilean numeron en majo, kaj deziras kontribuon de estrarano de AEA rilatantan al *EPĈ*. Kiu bonvolos (fantome?[1]) verki tion?

• ***La Brita Esperantisto*** fariĝis 90-jara per sia novembro-decembra 1994 numero, kaj dediĉis plurajn paĝojn de tiu numero al sia historio. Ni gratulas tiun nian plej malnovan nacian kolegon (ĝi estas nur la plej malnova nacia gazeto esperanta; la internacia gazeto *Dia Regno* estas pli aĝa je du jaroj). Jam de pli ol 20 jaroj William Auld redaktas *B.E.*, rekordo kiun egalos nur en la jaro 2009 via aŭstralazia redaktoro. Auld ne informis pri sia propra utopia celo; tiu de via redaktoro estas iam estonte eldoni tutan numeron de *ESK* sen la helpo de Odlo Bokserp.

• ***Kep Enderby kaj Ralph Harry*** la 7an de decembro diskutis kun la Ministro pri Turismo, Michael Lee, pri la estonta UK en Adelajdo 1997.

• ***Chris Dean donacis mil dolarojn*** al la *Ekparoli*-projekto de Profesoro Alan Bishop. La nova adreso de Chris Dean estas 178 Peninsula Rd, Maylands WA 6051.



fotis Li Liang


Haidi kaj John MacLeod ĉe la geedziĝo de S-ino Dongkemin kaj S-ro Wangtao en Shenyang Ĉinio, la 30an de oktobro 1994.

---

[1]*Fantome verki* = verki en la nomo de alia persono, laŭ ties peto.

RESPONDOJ POR LA BELETRA KVIZO

1. Ligia aŭ Callina, filino de reĝo de la barbara liga popolo, kiu estis sendita al Romo de sia patro kiel garantiulino. En *Quo Vadis* Henry Sienkiewicz (1846-1916) la plej populara pola romanverkisto kaj Nobel-premiito, priskribas la vivon de la fruaj kristanoj en Romo dum la regado de imperiestro Nero. Lidia Zamenhof, filino de d-ro L.L. Zamenhof, tradukis la romanon en Esperanton en 1933.
2. Colomba, "kruela heroino, la enkarnigo de la ĝismorta korsika venĝemo" donas sian nomon al *Colomba* verkita de Prosper Mérimée (1803-1870), franca majstro de la novelo kaj mallonga rakonto. La romano temas pri tradicia familia kverelo en Korsiko dum la pasinta jarcento. J. Beau faris la tradukon el la franca originalo en 1938.
3. Feodosia Nikolavna aŭ Fenička, kunulino kaj poste la dua edzino de Nikolao Petroviĉ Kirsanov. Ili rolas en *Patroj kaj Filoj* de Ivan Turgenev (1818-1883). Ĝi estas majstroverko en la ĝenro de la socia romano kaj reliefigas ne nur la antagonismon inter du generacioj, sed ankaŭ inter du mondoj kaj vidmanieroj en la 19-jarcenta Rusio. Kazimierz Bein (Kabe) elrusigis la verkon en 1909.
4. Margareta Celsing aŭ majoredzino Samzelius. Ŝi aperas kiel la "majorino" sur la paĝoj de *Gösta Berling*, ĉefverko de la sveda Nobel-premiito Selma Lagerlöf (1858-1940). La aŭtorino rakontas la aventurojn de la eksigita pastro, Gösta Berling, kaj la malriĉaj, dibočantaj kavaliroj de la bieno Ekeby en Vermlando, sia hejmregiono. Stellan Engholm esperantigis la romanon en 1934.
5. Marta Swicka, ĵus vidviniĝinta juna patrino, kiu alfrontas la problemon trovi vivrimedon por si kaj sia filineto. La romano *Marta* estis verkita de Eliza Orzeszko (1842-1910), romantika kaj progresema pola verkistino, kiu okupiĝis pri la kondiĉoj de la virino en la socio. La Esperanto-traduko, eldonita en 1910, estis farita de d-ro L.L. Zamenhof.



Sphyrna zygaena — *desegnis Igorj Sitnikov*

Januaro-Februaro 1995

ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

estas komuna eldonaĵo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio.

La Aŭstralia Esperanto-Asocio:
Prezidanto: Kep Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041.
Vic-Prezidantoj:
Vera Payne, 36 Donegal Road, Floreat Park WA 6014.
Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney SA 5069.
Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank Qld 4109.
Kasisto: Owen Loneragan, 16 Deverell Way, Bentley WA 6102.

Membrokotizoj: AŬ$30 por individuo, klubo, kc. (+$5 por familiano[j] ĉe la sama adreso); $20 (minimume) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto. Ĉiujn nomo- aŭ adreso-ŝanĝojn nepre sendu al la redaktoro: D-ro Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304, Aŭstralio. ☎ 096 46 1389. Elektronika poŝto: don@enkidu.dialix.oz.au

La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:
PO Box 8140, Symonds Street, Auckland 1035
Prezidanto: Brian Fox, 634 South Titirangi Rd., Auckland 1007. ☎9-817 8244.
Sekretario: David Rockell, 5-71 Princes St, Otahuhu, Auckland 1006. ☎ 9-270 3669.
Kasisto: Jackie Fox, PO Box 41-172, St Lukes, Auckland 1003.

Membrokotizoj: NZ$35 por individuo; $45 por geedza paro; $10 por studento aŭ junulo (< 20-jara). Kluboj po $1 por ĉiu ano, maksimume $15.

Ekster Aŭstralazio abono al *Esperanto sub la Suda Kruco* kostas 55 ned. gld., kio inkludas aerpoŝtan sendadon. Oni povas mendi la gazeton:
Per pago de 55gld en la konton ĉe UEA de la Libroservo de AEA, konto aeal-w, kun samtempa informo al la Libroservo de AEA, aŭ
Per mendo rekte al la Libroservo de AEA, pagante per 37 IRK (aĉetitaj post februaro 1992), aŭ per bankĉeko en Aŭstraliaj dolaroj AŬ$44. Sendu al la Libroservo de AEA.
En Usono kaj Kanado abono kostas US$28 kaj mendeblas ĉe ELNA.

Sendu ĉiujn komunikaĵojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la redaktoro.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas © 1995 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia estas © 1995 de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita.

Ĉi tiu numero de *ESK* estis perkomputile kompostita de Donald Broadribb, per Macintosh Classic II kun Sistemo 7.3, uzante Nisus 3.48; kaj Apple OneScanner kun Ofoto 2.0. Artikoloj kopiiĝis per OmniPage Professional. Alfabetoj uzitaj estas IF New Century Schoolbook 10pkt (Altsys Corp.), kaj Orion Esperanto 16pkt (disponigita de *Eventoj*).

Wholly printed in Australia. Typeset by Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304. Printed by Snap Printing, 921 Albany Highway, Victoria Park East WA 6101.